**PREĜINTENCOJ DE LA SANKTA PATRO KONFIDITAJ AL LA PAPA TUTMONDA PREĜO-RETO POR LA JARO 2027**

## JANUARO

**Por la malkovro de la forto de preĝo.**
Ni preĝu, por ke ĉiuj en la Eklezio malkovru la potencon de preĝo kiel persona renkontiĝo kun la Sinjoro kiu transformas nian koron kaj la mondon.

## FEBRUARO

**Por la prizorgo de tiuj, kiuj zorgas pri aliaj.**
Ni preĝas por tiuj, kiuj zorgas pri la integra sano de aliaj, ke ili ricevu necesan subtenon kaj kun pacienco, saĝo kaj forto povu malfermi vojojn de interna resanigo kaj espero.

## MARTO

**Por la respekto de la digno de homa vivo.**
Ni preĝu, por ke antaŭ kulturo centrita sur produktiveco kaj tujeco, ni sciu rekoni kaj aprezi unikan dignon de ĉiu persono: nia propra kaj tiu de aliaj.

## APRILO

**Por la arto, donaco kiu homigas.**
Ni preĝu, por ke arto estu akceptata kiel vera donaco, kiu nin igas pli homaj, levas nian spiriton kaj helpas nin kontempli la belecon de Dio en la kreaĵo.

## MAJO

**Por laborŝancoj por ĉiuj.**
Ni preĝu, por ke teknologia disvolviĝo malfermu vojojn al digna laboro kaj ke intergeneracia kunlaboro ebligu estontecon kie ĉiu persono povas oferi siajn talentojn al la servo de la komuna bono.

## JUNIO

**Por bona uzo de artefarita inteligento.**
Ni preĝu, por ke la disvolviĝo de artefarita inteligento ĉiam estu je la servo de homa digno kaj ke ni sciu ĝin uzi saĝe.

## JULIO

**Por geavoj kaj maljunuloj.**
Ni preĝu, por ke ni ĉiuj membroj de la Eklezio sciu aprezi la trezoron de kredo kaj saĝo, kiun gepatroj kaj maljunuloj donas al ni kaj ke ni estu pretaj lerni de ilia sperto.

## AŬGUSTO

**Por la vokiĝo de junuloj.**
Ni preĝu, por ke gejunuloj en la serĉado de propra vokiĝo rekonu en Jesuo Kristo la kunveturanton al kiu ili povas malfermi sian koron.

## SEPTEMBRO

**Por integra ekologia konvertiĝo.**
Ni preĝu, por ke ni lernu vivi novan rilaton kun la kreaĵo protektante ĝin kun justeco kaj trovante en kontemplado de la kreitaĵo la vojon al pli da harmonio kaj dankema vivo.

## OKTOBRO

**Por kristanaj komunumoj.**
Ni preĝu, por ke ĉiu paroĥo, komunumo aŭ kristana grupo estu centro de misia radiado kiu formas novajn disĉiplojn ĉe la servo de la Evangelio.

## NOVEMBRO

**Por la integriĝo de migrantoj.**
Ni preĝu, por ke migrantoj kaj delokigitaj personoj, akompanataj kaj konsolataj de la Sankta Familio en sia vojo de elradikigo trovu komunumojn kiuj akceptas ilin kun digno, solidareco kaj vera integriĝo.

## DECEMBRO

**Por la kristana vokiĝo de la familio.**
Ni preĝu, por ke kristanaj familioj estu vivantaj atestantoj de la Evangelio en la socio, lernante ĉiam pli esti hejmoj en kiuj oni nutras kredon, esperon kaj amon.